# *Organizoj religiaj kaj humanitaraj instigas la usonan registaron forigi punojn kontra? Kubo.*




Havano, maj 4 (RHK) Dek ses eklezioj, organizoj religiaj kaj humanitaraj de Usono sendis leteron al la registaro petante ?esigi ?iujn punojn truditajn de Donald Trump, ankora? validaj, kiuj dama?as la kubanojn kaj ties familiojn.

La letero estas adresita al la sekretarioj de ?tato kaj trezoro, la du registaraj strukturoj zorgantaj pri la apliko kaj kontrolo de la malracia sie?a politiko kontra? la kariba lando.

Kiel plurfoje denuncite, la ministro pri eksteraj rilatoj de Kubo, asertis ke “la blokado estas kruela politiko, kiu provokas suferojn, mankojn kaj limigojn al la kubaj familioj. ?i estas plifortigita tute intence dum la

pandemio de Kovim-19; ?i malfaciligas la aliron al medikamentoj, varoj kaj iloj necesaj”.

“Kiel la viruso provokanta tiun ?i pandemion, la usona blokado sufokigas kaj dama?as la kubajn familiojn”, li aldonis.

La kuba ministro sciigis, krome, ke Kubo fidas je la subteno de la internacia komunumo por ?esigi tiun ?i malhumanan politikon.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/256188-organizoj-religiaj-kaj-humanitaraj-instigas-la-usonan-registaron-forigi-punojn-kontrau-kubo

Radio Habana Cuba

**Radio Habana Cuba**